# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**

**PLENUMITA 15/02/2024 sescentsepdekkvara eldono (unua eldono 26/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;


**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**

Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/ https://globalsouth.co/

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)



## Esperanta Retradio



DONAS BONAN CIRKAU-5 MINUTAN AŬSKULTADON KAJ LEGADON ĈIUN TAGON

RECIKLADO DE BETONO SOLVU LA SABLOMIZERON

8a de februaro 2024 (*Roger Springer*)

**Mi gratulas al Vere Williams pro liaj grandegaj motorciklaj veturoj je tiom longaj distancoj.**

Mi ankaŭ ĝuis legi en AE 671 pri lia nekutima nomo. Precipe interesis min, ĉar mia bopatrino naskiĝis *Mona de Vere* Neilson; ŝia patro estis danlanda, la panjo s divenis divenis kotlanda. Se Google ne mensogas, jen iomete pri la origino de la nomo, Vere.

Verŝajne (ĉu vi rimarkis, *Ver....?*) *La Familio de Vere* estis antikva kaj potencoplena aristokrata familio angla, kies nomo devenas de *Ver* en Malalteja Normandio, Francujo. Dum 1627-1703 *Aubrey de Vere* estis la lasta Grafo de Oksfordo en la de Vere familio. (Eblas, kvankam ne probablas, ke *Edward de Vere* verkis la poemojn kaj teatraĵojn de William Shakespeare!)

*Vere* devenis de la angla; ĝi estas nomo ina aŭ vira kies signifo estas 'alno'. Sed *vere* ankaŭ estas adverbo signifanta same kiel en Esperanto.

Mia avino nomiĝis *Veronika*, mia panjo *Verona* kaj mi mem, *Vera.* Kompreneble mi devintus nomi mian unuan filinon *Verity!* (Sed mi ne faris tion.) Vera kaj Vjera en slavaj lingvoj, kiel en la Latina (*veritas*) signifas la *veron*, sed ankaŭ *kredon* (religia - iom ironie por mi.). Ĉisupre mi menciis la latinan, Danlandon, Skotlandon, Anglujon, Francujon, Kroation, Aŭstralion - kaj sendube *Vere, de Vere,* k.t.p. nun troviĝas mondvaste. Onya, Vere W.!



*Vera Payne*




En novembro mi renkontis Donnalouise. Ŝi loĝas en Novzelando kaj havas jutubkanalon nur pri puzloj. Mi donacis al ŝi puzlon de la Esperanto federacio de Novsudkimrujo kaj jen la rezulto. https://www.youtube.com/watch?v=V0m4pyn9Jew Mi esperas, ke dank' al ŝi multaj personoj scios pli pri Esperanto. Amike, *Nicole Else*



# La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo kunvenas je 10.30 atm ĝis 12ptm la unuan kaj trian sabatojn de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin. Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater, Suda Stejno. La 18a de Febuaro estos la tria sabato.

Venu! 02 9976 6320 *Roger Springer*

**3ZZZ** Dank'al la elsendo de la 12a de februaro vi ekscios kiu estas la esperantisto de la jaro 2024 kaj iom pri li kaj liaj agadoj. Energio en Francujo kaj ĉu ateistoj bezonas skribitajn moralajn regulojn estas aliaj temoj *Franciska Toubale*



